

## DE MUZIKO AL DIO – LA VOJO MALLONGA

### Riverenco al la patronino de la eklezia muziko

*La aŭtoro de la prelego Sac. Aleksandro Radecki prezentis ĝin al la partoprenantoj de la Bibliaj Tagoj en Wrocławo en la preĝejo de sankta Nikolao. Li komencis per jenaj esperantlingvaj enkondukaj vortoj:*

*“Sidas en kaverneto malgranda museto. Ĝi havas grandan deziron eliri eksteren, sed ĝi scias, ke super ĝia kaverneto kaŝobservas kato! Subite ĝi aŭdas bojadon de hundo, do ĝi pensas: se tie estas hundo, certe ne estas kato! Ĝi eliras kuraĝe el la kaverneto kaj... falas en ungegojn de la kato. La kato lekas fingrojn kaj murmuris: Kiel bone estas koni fremdajn lingvojn!*

*Mi ne konas Esperanton, tial mi parolos per la lingvo de koro, do, en la pola. Estu bonvolaj aŭfable pardonu tion al mi.”*

*Lian pollingvan prelegon interpretis esperantlingven frato Stanisław Śmigielski.*

Kompreneble temas pri la sankta Cecilia, virgulino kaj martirino. Interesa estas tio, ke kvankam tre malmulte ni scias pri ŝi, tamen ŝia nomo apartenas al la plej konataj kaj amehonorataj el inter la sanktularo kaj martiraro.

Vivpriskribo de la sanktulino verkita en la 5-a jarcento entenas rakonton pri la bela virino, nuptigita al pagano Valeriano, kiu ne nur konvertigis sian edzon, sed konservis

kun li ankaŭ purecon en la geedzeco.

Kaj kial ŝi estis proklamita la patronino de la eklezia muziko? Ĉar ŝi en sia koro kantadis nur al Dio. Kaj nenio estas eksterordinara, ke ni kun admiro spektas la vidaĵon de la famkonata Raffaello en Pinacoteco de Bolonjo, sur kiu la sanktulino kun la granda atentemo aŭskultas la ĉielan muzikon, rezignante pri la teraj muzikaj instrumentoj.

Sankta Cecilia diras al ni tra jarcentoj:



*Prelegas Sac. Aleksander Radecki - dekstre, tradukas Stanisław Śmigielski - maldekstre*

„Morti ne signifas perdi sian junecon, sed ŝanĝi ĝin je la pli bona. Estas tiel, kvazaŭ koton ŝanĝi por oro. Mia Sinjoro donadas pli, ol ni oferdonas al Li”.

Jes: je la gloro de Dio Cecilia „elkantis” per sia vivo la plej belan kanton, kian ni povas oferi al Dio. Amante ŝi kredis, kredante ŝi laboris por la perfektigo de si mem kaj de la aliuloj, ŝi perfektigante ĝojis, kaj kiam ekaperis malĝojo, ankaŭ en ĝi ŝi trovis valoron. Ŝi pli rapide ol aliaj maturiĝis en la plenan homecon en Dio. La esperiga morto, eĉ la tuta proceso de la turmentiga mortado, ne kaŭzis en ŝi mem disharmonion, eĉ ne en tiuj, kiuj kredis kaj kredas je la pureco de ŝia kredo kaj la perado de la preĝo.

Estu do tiu ĉi belega kaj sankta virino de antaŭ la jarcentoj nia apogo dum niaj renkontoj, ĉar al la altecoj de la sankteco estas vokitaj ni ĉiuj. Kaj instigitaj per ŝia imitmodelo, ni memorigu al ni la vortojn de la sankta Aŭgusteno: „Kantante per voĉo, vi kantu per koro, vi kantu per buŝo, vi kantu per via vivo”.

### **Kion ni volas priparoli?**

La kanton kaj muzikon ĝenerale kaj precipe la kanton kaj muzikon eklezian kaj religian (ĉar tio ne estas la sama). Ĉu estas la temoj pli gravaj en la mondo por ripenso? Kompreneble jes! Ĉu ni ne havas pli gravajn problemojn ligitajn kun nia ĉiutageco? Kompreneble jes – kaj multajn! Nu, pro kio do priparoli la kantadon kaj muzikon, se por solvo atendas tiom da malfacilaj aferoj?

Bonvolu do imagi jenan situacion: ni likvidu ĉiujn muzikajn instrumentojn, ĉiujn sonregistraĵojn de la ĉiuspecaj artverkoj; ni eliminu muzikon el televido, radio, sonaj muzikmelodioj de filmoj; ni malpermesu al homoj kanti kaj ludi ĉiun ajn muzikilon kaj ni forigu birdojn. Post kiom da tagoj ni freneziĝos? Kaj tiam (kiam ni freneziĝos) neniuj planoj kaj problemoj estos plu la kernaj – krom la problemoj... entombigi kelkajn miliardojn de enloĝantoj de la Tero. „Ĉar

la muziko estas io tre homeca. Sendependa de politiko kaj historio. Io homeca en la ĝenerala senco; mi dirus, ke muziko estas la natureca konstitua faktoro de la homa animo” (Patrick Süskind).

Restas ankoraŭ la demando: kial ni okupiĝu pri muziko kaj kantado eklezia? Ĉar ja en la preĝejoj ĉi tiuj formoj trovis kaj plu trovas sian plej belan esprimon kaj la plej elstaran rangon, kaj de tie ili priradias la vivon de la homoj. Kaj fakte nur tie la nuntempa homo povas kulturstile kantadi kaj tie levadi sian animon al la Sinjoro Dio. Kaj tiu trezoro bezonas gardadon flanke de ĉiu el ni, kaj ĉiu el ni portas iun eron de respondeco por ĉi tiu anima heredo.

Mi esperas, ke ĉi tiu enkonduko sufiĉas, por ke ni iru sentime al niaj konsideroj.

### **Specoj de la eklezia muziko**

Muziko liturgia, muziko eklezia, muziko sakrala – tio estas la muziko servanta al la religiaj ceremonioj, kiuj laŭ la instrukcioj de la lokaj ekleziaj instancoj estas konvena por la celebrado de la liturgio.

En la Katolika Eklezio reguloj por plenumado de muzikaj verkoj estas kodigitaj kaj difinitaj en multnombraj enciklikoj kaj konstitucioj. La tasko de ĉi tiu muziko estas plej simple dirite – la glorigo de Dio kaj la sanktigo de la fideluloj. Kaj tial tia muziko ne ekzistas por si mem, sed ĝi plenumas la privilegiitan rolon en la solenado de la sanktaj ceremonioj.

La plenumado de ĉi tiuj pretendoj kaŭzas, ke la kredantoj vivigas sian preĝan sintenon, kaj per tio ili pli facile progresas en la amo al Dio kaj la homoj – ĝis alteco de la sankteco. Skribis pri tio sankta Johano Krisostomo: „Nenio tiel levas la animon kaj faras ĝin kvazaŭ flugilhavan, nenio liberigas ĝin de la tero kaj de la teraj kunigiloj kaj nenio plenigas ĝin per la ŝato de la saĝeco (...), ol la kanto moduligita kaj Dia kantiko artisme kreita”.

La liturgia muziko disvolviĝas el unu-

voĉa gregoria ĥoralo. Per aldonado de pluaj voĉoj, ekestis multvoĉaj formoj de organo (dusono, mezepoka plurvoĉo), konduktuso (plurvoĉa latinkanto), moteto. La plej altan polifonian komplikiĝon la muziko atingis en la verkado de la nederlandaj komponistoj. La ĥorusa stilo a capella estiĝis la modelo de la eklezia muziko rekonita fare de la Trenta Koncilio (1545-1563). Baroko en la Katolika Eklezio disvolvis voĉ-instrumentajn tipojn: oratorion kaj kantaton.

La plej bela instrumento devenanta de Dio estas la homa voĉo. Dum la unuaj jarcentoj de la kristanismo en la liturgio oni uzadis nur la homvoĉon. Neniu instrumento kapablas ĝin imiti. En certa momento en la liturgion estis allasita orgeno. Ĝi estis la unua instrumento, kiu darfis ludi dum la celebro de la Eŭkaristio. Lige kun tio ĝi estis privilegiita kaj baldaŭ oni nomis ĝin la reĝo de la muzikinstrumentoj. Pli poste oni permesis ankaŭ la arĉajn instrumentojn.

La Luterana Eklezio enkondukis sian propran ĥoralon, komence kantantan unuvoĉe, pli poste en la tekniko *nota contra otam* (kontrapunkto). Kaj ni koncedu, ke multon ni povas ellerni de niaj gefratoj el Reformitaj Eklezioj en la fako de la zorgo pri sacrum (sankteco) en la eklezia muziko.

La Ortodoksa Eklezio enkondukis la apartan formon de la liturgia muziko deveninta el la ĥoralo sudslava kaj disvolviĝinta de la unuvoĉa stilo recitema – psalmodia („ĉantoj simptomaj”), ĝis la multvoĉa korusa kanto a capella en la koncertanta stilo.

Danke al ĉi tiuj diferencoj ĉiu invito al la koncerto aŭ la invito al la komuna preĝado per kantado fare de la menciitaj eklezioj, jam anticipe garantias al partoprenantoj de ĉi tiuj renkontoj grandan diversecon, grandan riĉecon de spiritaĵoj kaj religiaj travivaĵoj.

La liturgian muzikon oni devas diferencigi de la religia muziko, tio estas de la muziko pri la religia enhavo, ne servanta al la kristana liturgio kaj al la muziko ceremonia, tio estas la muziko utiligata dum la religiaj

ceremonioj ekde la antaŭhistoriaj tempoj.

## Riverenco al la religiaj popolaj kantoj

Estas bone, ke la Katolika Eklezio en „Direktorio pri la popola pieco kaj liturgio”, eldonita en la jaro 2001 fare de la Kongregacio por la Dia Kulto kaj Disciplino de Sakramentoj, eksterordinare aprecis popolajn kantojn, kiuj de jarcentoj estis praktikataj en preĝejoj dum la diservoj (ankaŭ dum Eŭkaristio) kaj ankaŭ en familiaj domoj. Tiu Biblia pauperum – Biblio por malriĉuloj – kaŭzis, ke tiuj plej simplaj homoj ne nur sciipovis laŭdi Dion, sed kantante ili plifirmigadis verojn de sia kredo kaj trovadis helpon en diversaj vivspertoj.

Bedaŭrinde tiu trezoro al niaj okuloj (kaj oreloj) malpleniĝas per la timiga tempo! Motivoj? Kaŭzoj? Oni devas ilin juste dispartigi inter klerikuloj, fideluloj kaj ĉiuj ekleziaj muzikistoj. Ni diru mallonge:

✓ Preĝoj devas „eksoni” – kaj tiucele estas bezonata tempo. Terura malbono en multaj sanktejoj estas rapido! Pro ĝi „suferas” precipe la kantado: de fideluloj, de voĉ-instrumentaj ensembloj kaj ankaŭ ludo de organistoj.

✓ Al la kredantoj oni devas disponigi kanto-tekstojn, kio verdire nuntempe ne plu estas problemo.

✓ Nepra estas la unuecigo de la kantantaj tekstoj en la kantoj.

✓ Bezonata estas ekzercado de la kantoj antaŭ la diservoj!

✓ Decidiga estas disvastigo de la repertuaro de la kantoj uzataj dum la liturgio kaj ekster ĝi (bonvolu kontroli, kiom da kantoj de libervola „fako” konas parkere ĉiu el ni, ekz. la kristnaskajn kantojn?). Kiel aspektas la repertuaro en nia paroĥo?

✓ La malbono de la neglekto estas „entrigi” de muzikaj talentoj de niaj infanoj kaj gejunuloj, strange evitantaj preĝejojn, kiel lokojn, en kiuj per la talentoj la junaj homoj povas servi al la gloro de Dio, al la ĝojo de la fideluloj kaj al la disvolviĝo mem.

✓ La trovo de konvena orgenisto koincidas hodiaŭ kun miraklo... (Ĉu tio estas nur la problemo de salajro?)

✓ Ĉiuj kantoj devas esti ekzakte sinkronigitaj kun la periodoj de la liturgia jaro, festotagoj, legaĵoj, celebrataj sakramentoj kaj kun la enhavo de ĉiuj diservoj.

Kiel videblas de ĉi supraĵa enrigardo, la senlaboreco ne devas minaci al ni en la fako de la zorgo pri la muzikoj eklezia kaj religia.

### **Trezoro bezonas respondecon kaj zorgon**

Jen la eldiro de la Papo – emeritulo Benedikto la 16-a, la granda konanto kaj amanto de la muziko: „Popolo de Dio kunveninta por la celebrado kantas la gloron al Dio. La Eklezio en sia dumila historio kreadis kaj plie kreas muzikon kaj kantadojn, kiuj estas la heredaĵo de la kredo kaj amo kaj kiujn oni ne devas perdi”.

Oni devas mencii, ke muziko ne estas aldonajo al la liturgio, ĝi estas liturgio. Muziko ne plibeligas, sed kreas liturgion. La ĉefa liturgo estas Sinjoro Dio. Li estas en centro kaj Li estas la plej grava. Ni renkontiĝas rilate al Li, por Lin adori. Ĝenerale la homa vivo devas prefere celi adoradon de Dio.

La muziko uzata dum diservoj devas esti perfekta kaj devas esprimi la sanktecon de Dio, al Kiu ĝi estas adresata. Ĝi devas ankaŭ sanktigadi ĝiajn plenumantojn.

Orgenisto, krom sciipovo ludi per la instrumento kaj kanti, devas vivi per la spirito de liturgio. Ĉiun tagon oni devas tralegi antifonojn, mesajn tekstojn kaj legaĵojn. Tio, kiaj verkoj estas plenumataj, ne estas la privata afero de la orgenisto. Li devas plenumadi tion, kion instruas la Eklezio kaj indikas liturgio. Ĉirkaŭ tio ekzistas multaj miskomprenoj. Ĉi tie ni ne povas cedi al iuj persvadoj, ni devas resti fidelaj al la Eklezio, ne povante ĝin perfidi.

Pio la Deko, unu el la reformatoroj de la eklezia muziko instruis, ke kiam temas pri repertuaro kaj nivelo de ĝia plenumado, la

Eklezio (kaj mi kuraĝu aserti, ke konfirmation ĉiuj, ne nur la romkatolikoj) ne povas toleri en liturgio verkojn trivialajn kaj kiĉajn. La liturgia muziko „devas esti arto vera, ĉar ne estas imageble, ke ĝi influu la animojn de tiuj, kiuj ĝin aŭskultas per tiu influo, per kiu la Eklezio intencas influi, akceptante al sia liturgio la arton de tonoj”.

Alivorte, la beleco kaj esprimo de liturgio dependas de engaĝigo de ĉiuj partoprenantoj en ĝian sinsekvon, ne nur de „oficialaj” ekleziaj muzikistoj. Ankaŭ aŭdanto – kiel partoprenanto de la liturgio – devas esti instigita al beleco kaj porti en si mem la deziron de la unuigo kun Dio.

### **Kantado kaj muziko estas la antaŭdiro de tio, kio atendas nin en la ĉielo!**

Ankoraŭfoje ni donu la voĉon al la Papo Benedikto la 16-a: „Por preĝi per la Dia Vorto, ne sufiĉas ĝin eldiradi, nepra estas la muziko. En la kristana liturgio du kantoj devenas de la bibliaj tekstoj, ilin kantas anĝeloj: Gloria (Gloria in excelsis Deo), kantata unuafoje fare de anĝeloj, kiam naskiĝis Jesuo kaj Sanctus (Sankta, Sankta), kiu laŭ la 6-a ĉapitro de la Libro de Jesaja (Jes 6,3) estas la alvoko de seraĵoj, troviĝantaj en senpera apudeco de Dio. En ĉi tiu lumo la kristana liturgio estas la instigo por kanti kune kun anĝeloj kaj por vort-esprimi ĝian plej altencelan signifon.

Nia konsidero ne povas malatenti, ke la tuta Sankta Skribo estas plena de muziko, kantoj kaj danco! Jesuo kantis Psalmojn, anĝeloj per la kanto laŭdis la naskiĝon de la Dia Filo, dancis reĝo Davido ... Muziko, kanto, ĝojo kaj festenoj atendas nin en la Ĉielo! Kaj do – tion mi jam en pli facila tono diras – ke ni kantu kaj lernu kanti, ludi, danci, ĉar alie ni kaŭzos al ni klopodojn en la Hejmo de la Patro, en la dua flanko de la vivo!

La lernado ludi tute ne estas tro malfacila; iam oni demandis la majstron Johanon Sebastianon Bach, kion oni devas fari por

estiĝi la famkonata orgenisto? La majstro respondis: „Ne multon. Ellerni nur tri aferojn: ludi, ludi kaj ludi!”

Tamen ni diru la veron: Estas inter ni, homoj, tiaj personoj, kiuj en ĉi tiu mondo... ne devas okupiĝi pri ludo per muzik-instrumentoj – en la nomo de la aktiva amo al la proksimulo!

Edzino sin turnas al la edzo kun la riproĉo:

Vi ne plu amas min! Iam vi dum tutaj vesperoj tenis mian manon, kaj nun...

Ekde kiam ni vendis fortepianon, ne plu estas ĉi tiu bezono.

### **Eminentuloj pri la muziko**

Ni ekĝoju, ke ni havas aliron al multaj interesaj impresoj de la eminentaj personoj, kiuj aprecis la valorecon de la muziko kaj kanto en la homa vivo. Jen kelkaj el ili por riprenso:

✓ „Kio estas la muziko? Ĉu eble la ĉielo kun muziknotoj anstataŭ steloj?” (Ludoviko, Georgo Kern).

✓ „Dio min estimas, kiam mi laboras, sed Li min amas, kiam mi kantas” (Rabindranath Tagore).

✓ „Feliĉaj estas tiuj, kiuj havas en la koro muzikon kaj ridon surbuŝe” (Franz Schubert).

✓ „Muziko estas la plej efika maniero disciplinanta, efikanta al bona influo de moraleco kaj sankteco” (sankta Johano Bosco).

✓ „Kantado estas la voĉo de la Eklezio, la nepra parto de la solenoj, ĝi faras belan eĉ dezerton, donas okupon al Anĝeloj, estas la spirita dekorado de ĉiela patrujo” (sankta Bazilo la Granda).

✓ „Bela muziko estas la universala lingvo, parolanta senpere de koro al koro, ekster muroj kaj limoj de la nacioj” (Pio la 12-a).

✓ „Muziko havas grandegajn kapablojn esprimadi belecon de ĉiu kulturo. El sia naturo ĝi povas kaŭzi, ke eksonos internaj harmonioj. Ĝi estigas intensivajn kaj profundajn emociojn kaj per sia ĉarmo esprimas

la profundan influon“ (sankta Johano Paŭlo la Dua).

✓ „Ĉu muziko prilaudas la vorton de la homo, ĉu ĝi aldonas la melodion al la Dia Vorto, ĉu ĝi sonas sen la vortoj, ĝi estas la voĉo de koro, vekas idealojn de beleco, aspiron al la bonega, per homaj pasioj nekonfuzita harmonio kaj sopiro pri la universala komunikado” (sankta Johano Paŭlo la Dua).

Konklude ankoraŭ du eldiraĵoj – unue de Marteno Luter kaj sekve de Johano Volfango Goethe:

✓ „Nur muziko povas kaŭzi tion, al kio laŭkutime estas ekskluzive kapabla teologio, tio signifas vekigi pacon kaj serenajn karakteron. Tio estas la certa signo, ke la satano dum la muziksonoj forkuras, preskaŭ tiel same, kiel ĉe la vortoj de teologio”.

✓ „De kie vi aŭdas kantadon – tien vi sentime eniru, tie la homoj korojn bonajn havas. Ĉar malbonuloj, ho, kredu min, ĉi tiuj homoj neniam kantas”.

### **Iom da revoj...**

Sankta Paŭlo instigis: Parolante unu al alia per psalmoj kaj himnoj kaj kantoj spiritaĵaj, kantante kaj psalmante en viaj koroj al la Sinjoro. (Efe 5,19) Ho, la homa parolo, ho la paroloj de la nuntempuloj – kiel vi malproksimiĝis de ĉi tiu idealo...

Kiel ŝanĝiĝus nia patrujo kaj la mondo, se ni sciipovus kaj ni volus kanti – unuope kaj komune, en la hejmoj kaj preĝejoj, ĉiutage kaj dum festoj – ĉie, kie por tio estas ebleco...

Sinjoro Dio, ĉu Vi elaŭdos ĉi tiun humilan peton por bonaj, kantantaj, homaj koroj...?